

PUBLISHED BY
-4 AUG. 1921
VICTORIA

La Suda Kruco

Organo de la Australiaj Esperantistoj.

Redakcio-Administracio :

Box 1367, Elizabeth-st. P.O.
Melbourne (Australio).

Abono (por dek du numeroj) :

Australio : 3 shilingoj.
Ekster Australio : 3 sh. 9 p.
au 18 respondkuponoj.

Anoncoj : Por 3 linioj : 1 shilingo au 4 respondkuponoj.

N-ro 5. Melburno (*Melbourne*) Australio. 1 Novembro, 1920.

ESPERANTO IN STATE SCHOOLS.

Esperanto marches forward with giant strides; it has passed out of the stage of novelty and faddism, and is regarded by the majority of well-informed people as an accomplished fact, in the same matter-of-fact way as they regard shorthand or wireless telegraphy or the aeroplane. In educational circles, we find Esperanto going ahead as never before. For many years it has been taught in private schools in an increasing number of places; and State educational authorities, who are naturally slower to act, are now making the teaching of Esperanto a feature of their official programmes in many centres. From this we can hope much. Those who learn our language in youth or childhood, when learning is easiest and the mind most impressionable, will acquire the language more easily than the stalwarts who take it up late in life, and they will learn it better. And with all these young Esperantists turned out into the world, the international language will naturally assume its rightful place in the international affairs of mankind—in science, in research, in commerce, and in art.

Recent Esperanto journals report many instances of the official adoption of Esperanto by educational authorities, not only in the old-established countries, but in the new

States which have been set up since the war. The following are a few such cases:—

The Government of **Finland** has made a grant of 5000 Finnish marks to the Finnish Esperanto Institute towards its expenses for the year 1920. The **Helsingfors University** has made Esperanto a subject for continuation classes for teachers of the People's Universities.

Many municipal schools in **Italy**, by direction of the town authorities, have included Esperanto classes in their programme; among them are those of Genoa, Bologna, Milan, Naples, and Turin.

The Education Department of **Saxony** has decided that Esperanto may be introduced by the local directorates of education into the curriculum of their schools, either as an optional or as a compulsory subject.

Elsewhere in **Germany**, at **Niederheimsdorf**, Esperanto has been made compulsory; at **Weinbohl**, the town council is paying the cost of teaching the language in the local school. It has been included as an optional subject at **Breslau** and **Neugersdorf**.

The Ministry of Education of **Czechoslovakia** has given permission for teaching of Esperanto in various schools, in **Pilsen**, **Budejovice**, **Kostelec**, **N.C. Lesy**, and other places. At **Saaz** an "Esperanto School" has been established.

The New York Chamber of Commerce has accepted Esperanto as a subject at its commercial examinations.

This is part of the progress of the last month or two only; it is typical of the steady progress of Esperanto from month to month and year to year.

THE GERMAN MINISTER OF EDUCATION: "ABSOLUTELY IN FAVOUR."

Herr Haenisch, the Minister for Science, Art and Public Instruction in Germany, has expressed himself in favour of Esperanto in a letter of which the following is a translation:—

"In regard to the desire to introduce Esperanto as a universal auxiliary language, I am absolutely in favour (*mi nepre estas favora*); but I am of the opinion that the time has not yet come for the introduction of Esperanto into the schools by my direction. However, wherever it is possible to introduce Esperanto into the schools, I will with pleasure examine any proposals that may be made, and will willingly assist in removing difficulties. The best way is that the Esperanto societies should above all bring the importance of their aim before the public, and by that means hasten the progress of their movement."

AUSTRIAN SCHOOLS AND ESPERANTO.

The Austrian Minister of Education, while announcing that he could not as yet order that the teaching of Esperanto should form part of the curriculum of the schools, has given permission to the union of Esperantist teachers to arrange private classes of Esperanto for the pupils of intermediate, commercial, second-grade and superior schools, and for the higher classes of first-grade schools. If certain conditions are fulfilled, the headmasters of the schools may recommend these classes to their pupils.

WHERE ESPERANTO IS TAUGHT IN GOVERNMENT SCHOOLS.

In England:

Birmingham.

Grimsby.
Hastings.
Sheffield.
Stretford (Manchester).
Bath.
Huddersfield.
Woolwich.
Sittingbourne, Kent.
Prestonpans.
Cowdenbeath.
Lochgelly.
Haworth, Yorks.
Keighley, Yorks.
Aberdeen.
Barry.
Leith.
Worcester.
Liverpool (in several schools).
Glasgow (in six schools).
London (in twelve schools).

In Australia:

Klal tio estas tiel?

STATE ELECTIONS.

QUESTIONS TO CANDIDATES

During the general election which has just taken place in Victoria, a committee of the A.E.A. took the opportunity of bringing the claims of Esperanto before the candidates, and of inviting their support. As education is a matter for the State Governments, the advisability of introducing Esperanto into the schools was the subject of one of the questions.

A circular was sent to all the candidates, inviting replies on the following points:—

"1. In view of Australia's ever growing relations with foreign countries, in which the language difficulty is so often felt, are you in favour of the official encouragement of the general use of Esperanto by Government departments having business abroad?

2. Are you in favour of the teaching of this simple language in the schools of the State, as is already done in many places in England?

aly, Portugal, Spain, Brazil, and other countries?"

We hope to print some interesting replies in the next issue of "La Suda kruc."

A notable instance of the use of Esperanto in Australia by a Government department arose from that much-debated project, the Federal Capital. Articles on the competition for the city plan appeared in one or two Esperanto journals, and led to several inquiries from abroad to the department concerned, and also led to Dr. Alfred Agache, a French cosmideano, to compete, and he gained the third prize. When the competition for the Parliament House design was arranged, the conditions were printed in Esperanto as well as in English, French, and German. And now one of our most distinguished cosmideanoj is the competitor who gained the first prize in the city layout competition, Mr. Walter Burley Griffin, the director of design and construction at the new city that is rising among the hills of Canberra.

NOVAJ GRUPOJ.

En Whangarei, sur la okcidenta ordo de Nov-Zelando, estas fondita nova grupo, kies prezidanto estas sinjoro D. Tilley, kaj sekretario — sinjoro W. H. King.

Propagandaj notoj en tiea gazeto "Grey River Argus" multe helpas la reskantan movadon.

En Rockhampton, Kvinslando, estas fondita nova grupo kun 30 membroj. La sekretario estas sinjoro Frank A. Barnard, Mitchell-rato, Rockhampton.

Gratulon kaj prosperon.

U.E.A. EN AUSTRALAZIO

Chiu Esperantisto scias pri la granda praktika organizacio, kiu tra tuta mondo servas Esperanton per Esperanto. Por vojaĝo, por komerco, por kolektado, por serchado de informoj, por kiu ajn fako de la internacia vivo, oni pli facile atingas ĉian celon per la helpo de UEA. Pri altvaloraj servoj, kiujn UEA faris ĉirkaŭ la milito, ne estas nun bezono paroli; fidela al sia idealo de interhelpo, la Asocio trankvile daurigas ĉian laboron; ĝhia plena politika neutraleco ebligis al ĝi venki mal-

facilojn, kiuj nepre malhelpis la agadon de pure naciaj organizacioj. Kaj nun post la milito UEA daŭre montras la povon de sia praktika idealo: fari Esperanton ĉiam pli kaj pli utila al la homoj.

Kvankam ne granda, "Esperanto," la gazeto de UEA, estas unu el la plej bonaj internaciaj revuoj en kiu ajn lingvo. Chiu homo deziranta esti plene informata pri nuntempa pensado en Eŭropo povas ne pli bone fari, ol aboni "Esperanto" 'n, tute egale ĉu li estas fervora Esperantisto aŭ ne.

Estas tre dezirinde havi delegiton de UEA en ĉiu loko en Australazio, kie estas Esperantistoj, sed bedaŭrinde pro ĉi tiu kauzo la delegitoj en ĉi tiu landaro estas nur malmultaj. Nia Esperanto havas radikojn en multaj lokoj, sed tre modeste ni tion ne konfesas. Ni ne plu kashu nian lumon malantaŭ arbusto! Estas simpla afero elekti delegiton kaj informi pri tio la centran oficejon de UEA, kaj mi ne dubas, ke la delegito en Melburno aŭ aliloke volonte donos informojn al ĉiu, kiu deziras alighi al la asocio kaj havi en sia regiono reprezentanton de ĉi tiu plej grava kaj praktika internacia organizacio.

MELBURNA JARKUNVENO DE U.E.A.

La jara kunsido de la Melburnaj membroj de UEA okazos vendredon, la 12-an de novembro, je la 9-a vespere, laŭ afabla permeso de AEA ĉe 350 Little Collins-strato. Oni esperas, ke ĉiu membro alestos kaj intertempe klopodos por varbi novajn membrojn.

Dum la pasinta jaro la devoj de la delegito ne tro sharghis lin, kaj li plezure entreprenus ankoraŭ utilajn servojn por eksterlanduloj.

Krom la persistaj petoj pri intershangho de poshtmarkoj (kiujn neniam akompanis respondkupono), la delegito faris diversajn utilajn servojn al demandintoj pri komercaferoj.

Dum la jaro UEA suferis pezan frapon pro la morto de sia sindonema direktoro, sinjoro H. Hodler, kaj lastatempe ni audas, ke la nuna redaktoro de "Esperanto," doktoro Privat, estas grave malsana.

Spite de ĉi tiuj malfaciloj UEA montras signojn de ĉiam pli granda

utileco, kaj la Melburna delegito (sinjoro C. W. Ballard) esperas, ke ĉiu Esperantisto en sia regiono subtenos la solan vere internacian unuighon de Esperantistoj.

PROPAGANDA KUNVENO EN GEELONG.

Lau decido de la konsilantaro de AEA, estas nun aranghata propaganda kunveno en la urbo Geelong. Kelkaj samideanoj el Melburno vizitos la urbon kredeble dum unu "intersemajno," kaj organizos publikan paroladon kun la subteno (se eble) de urba eminentulo. Oni esperas per tio starigi grupon kaj helpi la progreson de nia lingvo en la regiono.

Oni projektas poste organizi similajn kunvenojn en aliaj lokoj.

ESPERANTO EN VOJAGHO.

Sidneja komerca gazeto "The Australasian Manufacturer" enhavas interesan leteron pri utileco de Esperanto al vojaĝhanto. Tio rakontas, ke Australia samideano irinta al Japanujo trovis, ke "Esperanto malfermis al mi la pordojn en ĉiu loko, kiun mi vizitis... Dum mia restado en Japanujo mi faris ĉiujn aranghojn kun multe malpli da kosto kaj da peno," dank' al Esperanto. "Ĉiutage unu el la Esperantistoj estis mia gvidanto kaj kondukis min al diversaj lokoj, kiujn mi alie ne estus povinta atingi."

AGADO DE LA AKADEMIO.

La Esperantista Akademio fine rekomencis sian laboron. Kelkaj aferoj atendis decidon, kaj inter ili estis la multe diskutata demando, la sufikso por landnomoj. Sufikso "i" anstataŭ "uj" estis antaŭ longe proponita kaj foje uzata, malgraŭ forta opozicio de diversaj personoj. La demando estis sendita al la Akademio, kiu eldiris la jenan konsilon:

"Aparte pri landnomoj, ghi (la Akademio) insiste kaj forte konsilas, precipe al la gazetoj, sed ankaŭ ĝenerale al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa, por konservi la unuecon de nia lingvo, uzi nur la Fundamentan kaj tradician finighon 'ujo': Turkujo, Rusujo, Germanujo, ktp."

"La Akademio memorigas, ke en la jaro 1909 ghi oficiale voĉdeklaris kontraŭ la sufikso 'i' por la nomoj..."

"Akcepto de la sufikso 'i' por la nomoj ne sole estus grava ŝanĝo en la Fundamento, sed ankaŭ signi plenan disfalon de la tuta Esperanto-sistemo, en kiu la vorto 'Turko' ekzemple, nur povas havi la senon 'Turk-io,' nome, 'io turka turkajho,' tute same kiel 'bon-faro' signifas 'faro-bona.' La vorto jam ekzistas en Esperanto, la memstara vorto, kun la seno 'quelque chose,' 'etwas,' 'anything'... tial al la vorto 'io' ni ne povas nun doni la sencon 'lando.'"

Konforme al tiu konsilo, "La Suda Kruc" de nun uzos por la landnomoj la sufikson "uj."

Oni devas tamen memori, lau vortoj de la Akademio mem en tiu sama komunikilo, ke "ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, Akademio havas nek la rajton, nek la povon trudi aŭ malpermesigi ajn, sed la rajton ghi havas kaj devon doni konsilojn."

Sinjoro de Saussure, kiu en la tempo sin okupis per elpensado de novaj kaj ankoraŭ pli novaj lingvoj, ne plu estas membro de la Akademio, nek de la Lingva Komitato, sed elektas la Akademion. Sinjoro Saussure jam faris grandajn servojn al Esperanto, defendante ĝin kontraŭ maljusta kritikado de lingvistoj vidpunkto, sed lin mem, malfelicite, kaptis la nerezistebla manio senfina perfektigado.

La Akademio donas pluan gravan informon: ghi nun preparas trairi aldonon al nia komuna vortaro, kaj ankaŭ organizos prilaboradon de teĥnikaj vortaroj.

THE A.E.A.

ADJOURNED GENERAL MEETING

The general meeting of the Australian Esperanto Association, adjourned from the 2nd July, was held in Melbourne on the 15th October, when the committee presented for consideration a proposed new constitution for the consideration of the members.

The new constitution, which was on the lines of the old one, with certain modifications to better safeguard the rights of interstate members, was

accepted by the general meeting with one or two slight changes.

The principal points of the new constitution are that—

The name is changed to the Australasian Esperanto Association, and the committee is to be a council;

Meetings of full members, such as have been taking place in Melbourne on Friday evenings, will continue, but these meetings are to have no legislative power, and the cost of conducting such meetings is to be borne by the meetings themselves, and not by the general funds of the A.E.A. It was felt by the committee that this would avoid giving undue power to the Melbourne "ordinary meetings," which have taken the place of the old Melbourne Esperanto Society, and would avoid the delay and discussion entailed by drawing up a constitution for that society if it were revived;

Under the same conditions, other meetings of the kind may also be held in any town where the members desire it, for the study and practice of Esperanto;

The full members meeting in Melbourne have now to pay 15/- per year for membership, an increase of 5/-. This was one of the debated points, but the committee's recommendation was finally approved;

All members (that is, the full members just mentioned, the "associate" or isolated members, and the members of affiliated groups) now elect one councillor for every ten members, so that no one section of members has greater representation than any other; and

Any councillor may be recalled by the members who elected him, and another councillor elected in his place.

The other principal points of the new constitution are: voting by post for election of councillors, a more detailed statement of the Association's object, and the submission of the report and balance sheet to the affiliated groups for their approval.

The meeting was a quiet one, members evidently being prepared to accept the results of the committee's accumulated wisdom. Keen debate arose on a few matters only. The following affiliated groups were represented:—Sydney, Hobart, "Es-

pero" and Komerca (Melbourne), and Perth.

The issue of a diploma by the A.E.A. was decided on, the matter having been originally brought forward by Miss Sinnotte; the standard of the diploma examination is to be at least equal to that of the B.E.A.

A proposal by Mr. A. R. Cohen, to arrange systematic collecting of reports of Esperanto progress abroad, for use in propaganda, was accepted, and it was agreed to divide the work among several persons.

LA ESTONTA SOLDATO

De Aleksandro Semenov.

—Ho, Nikito, mia kara... vi foriras; kiam Dio revidigos nin?— ploris la maljunulino, pakante en tolan sakon la malluksan havon de sia filo-rekruto.

Larmoj rive re fluus sur shiaj maldikaj vangoj, tegitaj per pergamena haŭto kun multaj sulkoj.

Nikito sidis silente, melankolie rigardante tra la fenestro.

Sur malgranda placeto, super-shutita per malvarmaj radioj de l' suno autuna, ludis buboj de la vilagho. Chio, chio en la plej bagatela detalo estis la sama, kiel antaŭ 10-12 jaroj. Tie ĉi sur la sama kampeto tiam ludis Nikito kun siaj kolegoj; chio restis la sama... La sama ulmaro maljuna, che kiu la senindulga mano de l' autuno demetis la festan vestajhon; la sama klinighanta dometaro de vilaghanoj kun malhelaj fenestretoj malgrandaj; la sama stango kun blanka tabulo surskribita per grandaj nigraj literoj: Vilagho Zapola, 12 "kortoj"... Al la stango estis alligata la maljuna Antipo en tiu terura tago. De tiam pasis multe da tempo. La rapide fluanta vivo senhalte alportis novajn malfelichojn, novaj impresoj aperis en la kapo de Nikito... sed li ne forgesis la detalojn de tiu tago kaj ne forgesos, se li vivos ankoraŭ mil jarojn. La tuta pentrajho kvazau en panoramo rapide repasis en la memoro de Nikito.

Chio komencighis pro arbaro de l' bienhavanto, pro la arbaro, kiu estas videbla tie trans la rivero.

Mankis hejtajho kaj branchajho, la dometoj che la plimulto klinighis kaj estis disfalontaj... Tial la

vilagĥanoj decidis utiligi la arbaron de l' bienhavanto. Sed ili ne liveris eĉ dekon da traboj, ĉar Zapola'n subite atakis bando da kozakoj. La komandataj de senliphara oficiro. La vilagĥanoj estis alkurigitaj sur la placo, kie nun ludas la infanoj. Palaj, konfuzitaj, ili staris sen ĉapoj. La oficiro rajdis antaŭ ili.

—Ribeluloj! Mi ordonos, ke oni batu vin, kiel furiozajn hundojn... Kiu estas la iniciatistoj? Kiu? Eliru!... — kriis la oficiro, aldonante al ĉiu vorto aron da malkonvenaj insultoj.

La amaso silentis.

—Ĉu vi audis, malnobluloj! Elirigu tien ĉi la iniciatistojn; Porkuloj!

—Ni ne havas iniciatistojn... ni ĉiuj estas iniciatistoj, —eksonis ies trankvila voĉo.

La oficiro palighis pro kolero.

—Kiu arogante kuraghis diri tion? Kiu? Trouv tuje... —ordonis li al la kozakoj.

Post kelkaj sekundoj la kozakoj tenis en la manoj tute grizharan maljunulon.

—Ĉu vi diris pri iniciatistoj? Vi? Ne mensogu!

—Kial mensogi? Mi diris kaj diras: ni ne havas iniciatistojn, ni ĉiuj estas iniciatistoj, ĉar al ĉiuj mankas hejtajho kaj branchajho, ĉar ĉies dometo falas...

—Fripono! Vi diskutas? Batu lin bone!

La kozakoj, kvazau sovaghaj bestoj sin jĥetis al la maljunulo kaj en la momento forshiris la veston... En la aero ekfajfis skurgho, audighis bato sur ion molan... eksonis mallaŭta ghemo mallonga...

La amaso ektemis kaj instinkte sin jĥetis for.

—Staru senmove! — ekkriis la oficiro. —Se iu sin movos, mi ordonos pafi!

La amaso rigidighis.

Kelkaj monatoj pasis de tiu tempo, sed Nikito ghis nun klare vidas la blankan maldikan korpon de la maljunulo regule batatan per skurghoj, kvazau per drashiloj, postsignantaj malhelajn striojn. Ialoke la hauto krevis, kaj el la vundoj, guto post guto, fluas malhela sango. La maljunulo stertore ghemis.

—Dio mia, pardonu ilin... —audighis lia kaduka voĉo, bal-

butanta pro doloro kaj turmento.

—Kanaĵlo! Nun li Dion ekma-

moris... Rabonte, li ne ma-

moris... Batu do, batu... Ne

shparu la skurghojn... Ni aĉetot-

novajn.

La skurghoj regule levighis, fajfis en la aero, kaj falis sur la korpon. La ghemoj ĉiam pli kaj pli mal-

lautighis, la korpo konvulsie tremis.

—Sufiĉe! Levu vin! — komanda

la senliphara junulo, en kies manoj

sin trovis la vivo kaj morto de

grandagĥuloj.

La maljunulo kushis senmove.

—Levu lin kaj alligu al stango!

Post kelkaj minutoj la apenau spiranta maljunulo estis alligita al stango.

La tuta korpo estis kovrita per nigraj makuloj kaj teruraj vundoj. La grizhara kapo senvive mallevigis sur la bruston...

La amaso staris kvazau malviva.

Io timinda neeviteble pendis en la aero. Estis senteble, ke tuj farighos io monstra, abomena... Kio? Neniu el la cheestintoj povis klare respondi tian demandon.

—La ĉanojn supren! — eksonis akra voĉo de l' oficiro...

—Celu!

Du dekoj da pafiloj estis direktataj kontraŭ unu duone viva homo...

—Pafu! — Eksonis akra pafaro...

Ekaudighis ghemoj.

Kio estis plue, — tion Nikito ne memoris, ne konsciis. Iu estis vergata, batata, estis audata malkonvena insultado, plorado de infanoj kaj virinoj...

Nun, post longe, forironte milit-servi, Nikito image vidis la sovaghajn vizaghojn de l' kozakoj; en liaj oreloj sonis ghemoj kaj pafoj... Li ofte songhis, ke oni pafas ne kontraŭ la maljunulo sed kontraŭ li mem, la juna kaj fortoplana; li vekighis kun krio de teruro, malvarme shvitante.

De tiam lia mallaborema cerbo dormetinta 20 jarojn komencis senlaca laboradon. Li unufoje komprenis kaj konsciis, ke en la lando krom ilia mondo vilagĥana ekzistas ia alia mondo malamika, englutonta ilin.

Kiu estas la kulpulo de tiu tuta kruelado kaj moko; kies animon sharghos la granda peko? demandis

li sin mem, kaj ne povis trovi respondon. Tiaj pensoj tute okupis lin, kaj dolore turmentis: nenie, nenie li povis trovi pacon.

—Kiu?!—demandadis li sin mem.

—Chu la administranto, chu la poliestro, chu la oficiro ordoninta bati kaj paŝi? Sed ili ja ankau havas sian estraron. Kiu do? Chu la registaro? Au la bienhavanto ne permesinta utiligi la arbaron?

Nun, forirante militservi, li denove resolvidis la problemon proponitan de la vivo mem, li denove ripetadis la centfoje pripensitan.

—Nichjo,— interrompis lian senordan pripensadon la vocho de la maljuna patrino,—iru, manghu ion, jam estas tempo... Vi ja vidas, ke la patro enjungis la chevalon.

Nikito silente komencis manghi.

—Mia kara, mia karega; kiam Dio revidigos nin?— ploris la patrino.

Nikito glutis larmojn kun la pecoj da nigra pano malmola. Li sentis, ke la larmoj kvazau largha ondo rulas sin al la gorgho, ke post kelkaj minutoj li esploros, ploregos kiel infano.

—Panjo, ne ploru... Estas suŝeche malgaje kaj malghoje.

En la dometon venis la patro.

—Nu, Nikito,— diris li. —La chevalo jam estas preta... Preparu vin... Ni preghu Dion kaj veturu.

Nikito levighis de l' benketo, surmetis kitelon, sin zonis per rimeneto, kaj starighis apud la patro antau sanktfiguro.

Kun serioza tono solena la maljunulo komencis legadon de senfine longaj preghoj, petante la chiopovan Dion, ke li benu la rekruton-filon kaj helpu honeste elporti chiuajn malfacilojn de la vivo soldata.

De tempo al tempo ili ambau salutis ghis la tero kaj faris larghajn signojn de kruco.

Fininte, la maljunulo diris per delikata vocho karesa:—Nu, filo mia, petu nun benon che la patrino... ŝi benu la filon.

La patrino prenis de l' muro malnovan sanktfiguron, kovritan de tumaĵoj kaj proksimighis al Nichjo.

—Benu vin Dio... Honeste servu por la caro, plenumu vian devon... Chefe do ne forgesu.

Dio, ne forgesu... kaj ne pafu kontraŭ viaj fratoj, ne pafu kontraŭ

laboristoj kaj vilagħanoj... Pretere la estraro punu vin... Ne peku... Se vi tamen pafos, tiam memoru: mi ne benas vin... Mi malbenos... La patro ankau malbenos... Chu vi audas... guron kaj jhuru, ke vi ne pafos! Nu, kisu la sanktfiguron kaj jhuru, ke vi ne pafos!

El la Rusa lingvo tradukis Boriso Kotzin.

EL HEINE.

El miaj larmoj formighas Floraro de dolcha kolor',
Kaj miaj sopiroj farighas Nun najtingala hhor'.

Princino, en nokta horo
La florojn al vi donos mi,
Ekkantos flugila hhoro
La sonojn de l' amo al vi.

Tradukis L. Wijschenk.

"THE ESPERANTO GUIDE."

TRANSLATION OF THE EXERCISES.

Exercise 11.—La vidvo, kiun vi vidas, havas du filojn. La pli agha estas tiel simila al li per sia (or: la) vizagho kaj karaktero, ke chiu jaras pri ili. Ili estas ambau tiel malagrablaj, tiel fieraj, tiel obstinaj, ke oni ne povas vivi kun ili. La pli juna estas tute malsimila al sia (or: la) patro, kaj estas unu el la plej belaj knaboj, kiujn oni povas trovi. Li estas la plena portreto de sia avo. Mi pensis: "Mi vidos lin en Aprilo." Mi pensis, ke mi vidos lin en Aprilo. Li diris: "La patro estas tre fiero." Li diris, ke la patro estas tre fiero. Vi diris: "Mi skribis leteron." Vi diris, ke vi skribis leteron. Simileco; honesteco; juneco; blankeco; beleco. Amikeco; dolheco; paleco.

Exercise 29.—Venu kun mi al lia domo. Niaj soldatoj batalis kuraghe kontraŭ la malamiko. Kion vi faris el la ligno? La infano ridis pro (or: de) ghojo. Li tranchis sin per tranchilo. Ni parolis pri birdoj kaj bestoj. Vi devas veni kiel eble plej rapide (or: kiel eble pli rapide). Estu fidela al vi mem. Je (or: pro) mia peto li iris viziti (or: li vizitis) la inghenieron. Ili kredas vin, sed ili miras tion, kion vi diras. Mi petis du biletojn, sed la bilepisto donis al mi nur unu. Pruntu al mi viajn (or: la) orelojn. (Next month: Exercises 12 and 30).

SONORILOLUDO.

Vespere en la kora, dolora monotono
subite jen eksonas la sonorila sono.

Kun frapo tremanta,
kun vocho ghemanta,
la batoj ekbruas,
fenestron ekskuas
mughado la sorchas.
Ho, son' sonorila,
vi tondrosimila,
kaj tamen trankvila,
ravanta kaj sorchas!

Doloro de kore tremanta, dronanta
sufokas. Ni vokas al bronzo sonanta.

Ho, svingu la langon,
vi tondre batanta!
Ho, plend' via granda
travibru la landon!
Ho, plendu la fonton
de l' sanga riprocho!
Ho, tondru la vocho,
kaj fendu la monton,
estingu flamlangon
de l' sent' malamanta,
de l' blinde flamanta.
Atingu la kanto
la koran profundon
por vindi la vundon
sangintan pro vanto.
Ho, sorchu la senton,
indulge lulante;
kaj larmojn rulante,
eksolvu la penton.
Ho, vibru la kantoj;
vi fandu la mondon
en rond' de amantoj!

Kor' brulas, voch' lulas, min levas,
mallevas;

pri flamo de amo flagranta mi revas.

Ke rughaj flamlangoj
disflugu tra landoj!
Ekruhu la vangoj,
en fratchirkaupreno!
Kaj frate en rondo
solena, tra mondo
ekmughu la ondo
de l' kant' pri kompreno!
Sed ho, ve, tremante,
lastfoje ghemante,

kun mortadanta unuigho forsonas
bronza tono,

kaj kaptas min denove dolora
monotono!

Originale verkis doktoro K. Kalocsay
(Hungario).

LA STATUO DE LA MAJSTRO.

En Bielostoko, antau malgranda
domo staras statuo de homo mezagha,
de modesta aspekto, kun idealista
vizagho de homamanto, kaj okuloj
de geniulo.

Vizitantoj venas el multaj landoj,
el Europo kaj el trans la maro:
Vov-Zelando, Chilio, Japanujo,
Afriko, por rigardi kun emocio kaj
preskau sankta respekto la humilan
naskodomon de granda bonfaranto de
la homaro.

Sur la statuo estas mallonga, sed
plene suficha, surskribo: "Zamenhof.
Aŭtoro de Esperanto. 1859-1917."

Knabo el la urbo, samurbano de la
geniulo, rigardas dum momento la
statuon, kaj demandas al knabo-
amiko:

—Kion signifas la ciferoj?

—La ciferoj? Chu vi ne scias?
Tio estas lia telefona numero.

In spite of the imprint, "Published
by the Australian Esperanto Association,"
inserted by two separate
printers without reference to the
redakcio, "La Suda Kruco" is an
independent journal, and is not
published by the A.E.A. or any other
Esperanto group.

La proksima numero (dubla
numero kun 16 paghoj) aperos en
1 Januaro.

SINJORO LOUIS PREVOST, 76
Boulevard de Champigny, La
Varenne, St. Hilaire (Seine),
Francujo, volas intershanghi posht-
markojn de Francujo kaj Francj
posedaĵoj por tiuj de Australio.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Presejo de Fraser kaj Morphet, Eastbourne-str., Prahran,
apud Melbourne.